

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Rasputin

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

Grigorij Jefimoviĉ Rasputin (1869–1916) fariĝis unu el simboloj de carismo en Ruslando. Siberia kamparano, kiu penetris caran korton kaj influis caran familion kaj nerekte eĉ politikon de grandega lando. Ĉarlatano, alkoholulo, ĉasisto de virinoj, sed ankaŭ inteligenta viro kun forta volo, kiun li sciis bonege uzi. Jam dum sia vivo li fariĝis fama persono, sed lia vera vivo kaj morto estis kaŝitaj sub tavoloj de multaj legendoj. Stranga konduto kaj sukcesoj de tiu ĉarlatano de cara erao estas studendaj ankaŭ pro tio, ke baldaŭ post lia morto aperis en historia scenejo pli danĝeraj kaj pli kruelaj ĉarlatanoj, sur kies kontoj estas milionoj da viktimoj.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 8-an de Decembro 2020 je la 18-a h.

**Kie:** La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo). Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, mi petas vin instali ĝin. Oni povas elŝuti la programon el retejo <https://www.skype.com/cs/get-skype/>. Vi povas uzi ĝin per komputilo, tabletkomputilo kaj saĝpoŝtelefono (Android kaj iPhone). La sistemo funkcias ankaŭ per retumilo (Edge kaj Chrome), sed ni rekomendas uzi programon.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ esperantistoj el fremdaj landoj. Ni vidos.



## Nia cetera programo en Decembro

La 15-an Kial mi fariĝis esperantisto (memorojn de klubanoj) Okaze de Zamenhofa tago. Afiŝojn por Zamenhofa tago, kiuj estas kunsendataj kun tiu-ĉi invitilo, verkis Renato Corsetti. La ĉeĥan mi ankaŭ havas en presa kvalio.

La 22-an kaj la 29-an de Decembro renkontiĝoj ne okazos. Mi petas vin, ke vi sendu al mi viajn proponojn de programo por Januaro. Verŝajne niaj renkontiĝoj okazos ankoraŭ rete



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brna](https://eventaservo.org/o/EO_Brna))

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Milan Kolka  
vicprezidanto